




2*3-1985

Starto

ORGANO DE
ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO





KURACA SANATORIO J. FUČÍK
TEPLICE V ČECHÁCH

NOVA KURACA DOMO PRO MALSANOJ
DE LA MOVEBLAJ ORGANAROJ



INFORMOJ SENDOS KAJ CERTIGOS
KURACADON

BALNEA, reprezentace československých
lázní a zřídel,

110 01 Praha 1, Pařížská 11, telefon: 26 37 77, telex: 122 215



La fotografajoj montras membrojn de Esperanto-rondeto de Pacdefendantoj de DK RSM DUKLA, kiuj partoprenis la unuamajan manifestacion en Pardubice. Ĉi-jare oni unufoje komune manifestaciis sub la nomo de Esperanto-rondeto de Pacdefendantoj en la stratoj de Pardubice kaj espereble tio ne okazis lastafoje.

/M. Hemerková/

VII-a Renkontiĝo de Pacdefendantoj

en Pardubice

Ankaŭ ĉi-jare bonvenigis la partoprenantojn de VII-a Renkontiĝo de Esperantistoj-Pacdefendantoj en Pardubice /29.-31. 3.1985/ gaje flirtantaj flagoj de la statoj, kies reprezentantoj alveturis, por manifesti sian pacamon. Apud niaj ŝtataj kaj Esperanta, vicigis fratece la aŭstra, bulgara, franca, GDR-a, hungara, kanada kaj sovetia flagoj. La suno ridetis same kiel la gesamideanoj, demonstrantaj siajn dezirojn helpi konservi la pacon, aŭdi pri novaĵoj, koncernantaj pacagadon en diversaj landoj, renkonti geamikojn kaj ĝui la MEM-etoson.

La unua tago de la Renkontiĝo komenciĝis, jam tradicie, per akcepto de nia delegacio far urbestro de la gastema urbo Pardubice. Sekvis humila kliniĝo kaj meto de florkrono en Zámeček-memorejo, omage al la viktimoj de faŝismo de la dua mondmilito. Poste la gastoj vizitis, laŭ propra elekto, tri urbajn entreprenojn. Interese, ke plej gaje revenis tiuj, kiuj elektis la bierfarejojn. Sed vespere ĉiuj estis ne nur gajaj, ni ne timu diri, ke ravitaj. La kulturvespero prezentis al ni altnivelan programon, kiun kulminigis la monologo, eminente verkita de Josef Rumlér kaj prezentita de Eva Seemannová kun ĉarmo kaj majstreco neeldireblaj, neforgeseblaj. Ankaŭ operkantisto Miroslav Smyčka artpinte prezentis esperantlingvaj ariojn, kantojn, interalie li premierigis la kanton "Paco", kies tekston verkis Eli Urbanová, muzikon O. Maršík. La programo riĉegis. Kion pli frue menciis? Ĉu la baleton "Morto kaj profetaĵo" laŭ muziko de Leoš Janáček, aŭ la akordeonkoncerton impresanta kiel orgenmuziko? Ĉu la angorforpelintan, gajan, aminde freŝan folkloran kant-kaj danc-ensemblon "Lipka"? Nesilentiganta aplaudo finis la kulturvesperon.

La dua tago, la plej grava, estis dediĉita al serioza pritrakto de niaj porpacaj aferoj. Malfermis ĝin prezidanto de CEA, D-ro Jaromír Jermář, CSc. Sinjoro Šimon, urbestro, bonvenigis kore ĉiujn partoprenantojn kaj deziris al nia traktado multan sukceson. La sekvanta parolanto, prezidanto de Urba Pakkomitato, s-ro MUDr. Kovář, ĥirurgo helpinta savi vunditojn en la korea milito, arde admonis ĉiujn homojn defendi la pacon.

Prezidanto de MEM, D-ro Imre Pethes, akcentis en sia prelego la 40-an datrevenon de la paca vivo kaj rememoris 50 milionojn da militpereinetoj. Li pritaksis la hodiaŭon kaj interalie apelaciis: "Karaj geamikoj! Ni esperantistoj-pacdefendantoj havas grandan noblan taskon, respektive devon, ĉar la Esperanto-movado ne estas nur lingva, sed ankaŭ idea agado firme ligita kun pacaj ideoj kaj amikeco inter popoloj. Tial ja

nia movado pozitivas al interkomprenigo de popoloj, ni pli kaj pli ĝin eluzas por pacaj celoj. Ni klopodas plifirmigi la pacon bone sciante, ke felica vivo de niaj infanoj eblas nur dum paco..."

Fine de sia prelego prezidanto de MEM dekoraciis per honorgrdeno samideaninon Eva Seemannová, pro sia multnombra kontraumilita aktorado al esperantistoj kaj samideanon Karel Franc pro lia longjara pacagado kaj organiza laboro de pacrenkontigoj. Kaj prelegis D-ro Satura, prezidanto de MEM-SEA, s-ano Juven el Francio ankaŭ en la nomoj de s-ano Gilbert kaj de la belgaj samideanoj-pacdefendantoj, la soveta, germanaj, hungara, aŭstraj, bulgaraj kaj kanada gesamideanoj kaj ĉiuj esprimis la decidon defendi la pacon, malhelpi la pluan disvolvon de atomarmiloj, malpermesi ilian dislokadon en kosmon. La diskuto sajnus ne finiĝi. Tamen la lasta parolanto, prezidanto de MEM-sekcio de ĈEA, dankante finis la diskuton, oni akceptis unuanime la rezolucion kaj ĉiu forirante sciis, ke li solas nek en defendo de la paco, nek en sopiro je transdono de nia terglobo al la posteuloj sendifektita. La solena kunveno finiĝis per la Esperanta himno.

Kvankam ni jam iomete lacis, tamen la instruistoj renkontiĝis kun siaj gelernantoj el skribaj kursoj kaj ankaŭ okazis la kunsidoj de la sekcioj medicinista, pedagogia, junulara kaj fervojista.

La vesperan balon malfermis arta antaŭdanco far dancsocieto de sindikatoj Dukla, lotumado, kiĉs profiton oni dediĉis al la pacfonduso kaj oni dancis, gojigis, amikigis de vesperogis mateno. La lastan tagon la plejparto ekskursis autobuse al Ležáky, tie per floroj omagis la logantaron, mortigitan de fasisistoj, kaj en Veselý kopec /Gaja Monteto/ trarigardis belegan skanzenon. Post la reveno oni promenis tra la pitoreska malnova urboparto de Pardubice.

Satantoj de belartoj vizitis la impone rekonstruitan kastelgalerion kaj rigardis la porokaze ekspoziciitajn restauritajn bildojn kaj aliajn artaĵojn el kelkaj cehaj kasteloj.

En la urbocentro vizitendis ankaŭ la ekspozicio de ĉarmaj desegnaĵoj far konata artpentristo-pacdefendanto nia s-ano Pavel Rak. Ni ankaŭ ne forgesu noti la vendadon de Esperantaj libroj, glumarkoj k.s., de belegaj poŝtmarkoj, je dispono estis porokaza stampilo, ĉio eminentis.

Pro teknikaj kaŭzoj oni ĉi-jare iom reduktis la nombron de ĉeestantoj je ĉ. 450, kio igis la etoson pli trankvila, pli intima.

Fine ni ne forgesu esprimi admiron kaj dankon al la pardubicaĵ gesamideanoj pro la perfekta preparo de la pacrenkontigo.

H. Štruncová



La partoprenantoj de la Pac-renkontiĝo metis bukedon
al la nacia memorejo en Ležáky.



PROKLAMO

La VII-an renkontigon de pacdefendantoj en la tagoj 29.-31.3. 1985 en Pardubice, Ĉeĥoslovakio, partoprenis esperantistoj el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Francio, Kanado, Hungario, Germana Demokratia Respubliko, Aŭstrio kaj Sovetunio kaj civitanoj el Pardubice. La partoprenantoj je fino de la traktado konstatis, ke malgrau strebado de absoluta plejparto da homoj nur mia planedo pri konservado de paco plu dauras armad-konkurado, elvokata de agresema internacia politiko de reakciaj rondoĵ far reganta milit-industria komplekso de Usono, kiu klopodante akiri ne limigitan influon super mia tuta planedo, strebas pri

- atingo de superaĝo en ĉiaspecaj armiloj kaj por ilia dislokigo misuzi ankaŭ la kosman spacon,
- plua modernigo de armiloj kemiaj, bakteriologiaj kaj biologiaj kun la celo plialtigi ilian detruan efikecon,
- ekflamigon de lokaj militoj helpe de ŝovinismaj, revengismaj kaj neonaziaj movadoj.

La partoprenantojn konsternas la fakto, ke Usono kaj pluaj nukleaj grandpotencoj la devontigon de Unio de Sovetiaj Socialismaj Respublikoj, ne uzi nuklean armilon kiel la unua, ignoras, same la inviton, ke ili anoncigu al ĉi tiu devoligo.

La partoprenantoj de la renkontigo tial alvokas esperantistojn de la tuta mondo, ke sian strebadon ili direktu kontraŭ iniciatantoj de la nuklea, kemia, bakteriologia kaj biologia armadoj kaj kontraŭ la misuzo de la kosmo por realigo de iliaj mondaj hegemoniaj celoj.

La partoprenantoj plene subtenas la alvokojn de la prezidio de MPK en Moskvo el 25. 3. 1985, nome:

"La jaro de la 40-a datreveno de la venko super la faŝismo iĝu la jaro de la venko super la minaco de nuklea milito kaj ne al la stelaj militoj!" kaj alvokas esperantistojn plenumi fiksitajn en ili taskojn kaj agad-konceptojn.

La partoprenantoj de la renkontigo turnas sin al ĉiuj esperantistoj, kies komunikilo - Esperanto servas al pli bona interkomprenigo kaj kunlaboro inter la popoloj, ke ili pli intense uzu la lingvaĵn kaj movadaĵn rimedojn por plua interfratigo, kultura intersango, protekto de homa medio kaj por pli profundaj kontaktoj inter la homoj cele helpi tiel al plifirmigo de pacaj ideoj.

Pardubice, Ĉeĥoslovakio, la 30-an de marto 1985

La partoprenantoj de la VII-a
RENKONTIGO DE PACDEFENDANTOJ
en Pardubice

Sukcesplena renkontiĝo

Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica fariĝis sidejo de la 18-a konsultiĝo. La traktadojn ĉeestis ĉefaj funkciuloj de Esperanto-organizaĵoj el ĉiuj Europaj socialismaj landoj kaj reprezentantoj el Kubo kaj Popola Vjetnamio. La organizaĵoj - Bulgara Esperanto-Asocio - kreis eksterordinarajn kondiĉojn por laboro de ĉiuj delegitaroj. Serion da kunvenoj, dum kiuj oni interkonsultis laborplanojn de opaj naciaj asocioj por venonta jarperiodo kompletigis filmprojekciado, ekskursoj al urbo Smoljan kaj turisma centro de Rodopa montaro Pamporovo, renkontiĝo kun tieaj esperantistoj kaj pluaĵ programeroj. Je la fino de kvintagaj traktadoj oni akceptis komunan deklaron, kies tekston ni publikigas.

Ĉefan Esperanto-Asocion dum tiu ĉi konsultiĝo reprezentis trimembra delegitaro, kiu konsistis el prezidanto D-ro J. Jermař, unua vicprezidanto Ing. V. Kočvara kaj prezidantino de Junulara sekcio de ĈEA D-rino M. Vančurová.

vlk

— DEKLARO —

Inter la 15a kaj 20a de aprilo 1985 en Pisanica - Internacia Esperanto-Kursejo okazis la XVIII-a Konsultiĝo de reprezentantoj de Esperanto-organizaĵoj el socialismaj landoj. Ĝin partoprenis delegitaroj de Esperanto-organizaĵoj el Bulgario, CSSR /Ĉeĥa kaj Slovaka Asocioj/, GDR, Hungario, Kubo, Pollando, Rumanio /observanto/, Soveta Unio kaj Vjetnamio. La partoprenintoj substrekis la respondecon de siaj asocioj en la tutmonda agado kaj batalo por la konservo de la paco kaj por malarmado. Ili omagis al la 40a datreveno de la venko super la faŝismo, kaj salutas la unuflankan pason de Soveta Unio pri haltigo de la lokigado de raketoj, atendante adekvatajn reagojn de USONO.

La delegitaroj interŝanĝis spertojn pri la agado de siaj asocioj por la komuna progreso de la Esperanto-movado en nacia kaj internacia niveloj.

La partoprenintaj asocioj

- difinis taskojn por kunlaboro inter si;
- emfazis la gravecon de kunlaboro kun neesperantistaj sociutilaj organizaĵoj por reciproke kontribui al atingo de komunaj celoj kaj por antaŭenigi sciencon rekonon de la valoroj de Esperanto kiel komunikilo;
- substrekis la gravecon de faka aplikado de Esperanto;
- interkonsentis pri aktivecoj prepare al la 100-jara jubileo surbaze de la jubilea laborplano de UEA.

La delegitaroj dankas al Bulgara Esperantista Asocio pro la ekskluzive bonaj laborkondiĉoj.

Pisanica, 20.04.1985.

La plenkunsido de Centra Komitato de ĈEA la 20-an de oktobro 1984 aprobis la agadplanon por rememori la jubilean jaron 1987 - la centan datrevenon de Esperanto. Ĉar la jubilean jaron 1987 sekvas ankaŭ aliaj gravaj jubileoj de la Esperanto-movado en nia lando, nome en la jaro 1990 la 100-a datreveno de Esperanto en Ĉeĥio (la unua lernolibro de F. V. Lorenc) kaj en la jaro 1992 la 400-a datreveno de la naskigo de J. A. Komenský, oni akceptis planon de jubileaj solenaĵoj por la jaroj 1987 - 1992.

Laŭ tiu ĉi plano oni antaŭvidas i. a. arangon de ekspozicioj, eldonon de afiŝoj, aperigon de jubilea medalo, eble ankaŭ de postmarko, eldonon de novaj lernolibroj, vortaroj kaj frazaroj, eldonon de ĉeĥlingvaj libroj pri la historio de Esperanto kaj pri la interlingvistika problemaro, aperigon de artikoloj en ĵurnaloj, gazetoj, radio kaj televido, eldonon de Ĉeĥa Antologio kaj de Esperanta novelaro en la ĉeĥa traduko, arangon de Esperanta Kulturfestivalo, de renkontigo de Pac-defendantoj, de faka seminario aŭ konferenco pri la problemoj de la internacia lingvo ktp. La agadplanon oni jam anoncis al la lokaj grupoj pere de "Informoj de ĈEA".

— Alvoko al niaj legantoj! —

Nia movado staras ĉe sojlo de gravaj solenaĵoj, per kiuj ĉiuj esperantistoj alrememorigos al la tuta mondo, ke la internacia lingvo Esperanto vivas kaj perfekte servas al interkomprenigo jam 100 jarojn. Ankaŭ la Ĉeĥa Esperanto-Asocio volas kontribui al tiu ĉi elstara jubileo per agoj, kiuj vekos vastan resonon inter la ĉeĥa publiko, kiuj al nia membraro alportos neforgeseblajn rememorojn kaj kiuj ankaŭ plinombrigos niajn vicajn. La estraro de ĈEA akceptis riĉan planon por jubileo, kiun oni jam anoncis pere de "Informoj de ĈEA" al ĉiuj lokaj grupoj kaj movadaĵoj funkcioj. Sed - ĉiu grava ago bezonas adekvatan rimedon. Precipe la agoj pri jubileaj, ĉar ilin ni devos realigi paralele kun kutima ĉiujara agado de nia asocio.

Tial la Centra Komitato de ĈEA decidiĝis fondi

JUBILEAN FONDUSON

kies celo estas prizorgi necesajn financajn rimedojn por subteni ĉefe la jubileajn eldonaĵojn eventuale kun ili ligitajn pliajn arangojn. La Centra Komitato atendas de ĉiuj fidelaj esperantistoj kaj ankaŭ de amikoj de Esperanto en nia respubliko, ke ili grandanime donacos monon al la fonduso. Ĉiun donacinton oni publikigos en Starto. Por la plej malavaraĵoj donacintoj, kiuj donacos minimume 100 kronojn, estas preparita belaspekta jubilea dankdiplomo, kiun oni publike transdonos al la koncerno.

Jen la okazo por ĉiuj montri, ke nian lingvon kaj la movadon oni subtenas ne nur buŝe kaj morale, sed por ili oni ankaŭ pretas oferi parteton de propraj monoj.

La donacojn oni sendu nur per postĉekoj de la asocio kun kodo 375.2. Petu la pagilon en sekretariejo!

VK

* * *

Interesan "neoficialan" statistikon mi legis en STARTO /1984-2/ "pri la situacio en kelkaj europaj Esperanto-asocioj en socialismaj landoj". Temas pri ses asocioj /Bulgara, Ĉeĥa, GDR-a, Hungara, Slovaka, Pola/. Jen la resumo.

Proksimuma membraro	37.000
Lokaj grupoj	991
Pagitaj oficistoj	81,5
Stata rekta subvencio	/en diversaj valutoj/

Ĉiu statistiko, do ankaŭ tio estas pensiga. Kiel en la tuta mondo, ankaŭ en la socialismaj landoj la nombro de la esperantistoj estas sensignifa; promilo de la logantaro aŭ eĉ malpli. Sed la forto de la esperantistoj estas ne la nombro, sed la ideo de Esperanto, kiun ili reprezentas kaj la pruvo, ke ili parolas vivantan lingvon disvastigantan sur kvin kontinentoj. Esperanto baldaŭ fariĝos centjara kaj ĝin kiu ajn povas ellerni kaj uzi sur multaj terenoj de la vivo. Temas pri tutmonda organizaĵo, kies unu cenero estas la landa asocio, kiu povas esti ankoraŭ malforta, sed Esperanton oni neniam jucu laŭ unu lando. Tion diru mi al ĉiu.

La nombro de la esperantistoj en la ses socialismaj landoj estas pli multa ol laŭ la statistiko en STARTO, ĉar parto, generale la pli granda parto de la esperantistoj, ne aliĝas al la asocioj pro diversaj kaŭzoj. Ni rajte povas supozi, ke la nombro atingas ĉirkaŭ centmil. Ja Rumanio mankas en la listo kaj la nombro de la esperantistaro en Sovetio certe estas pli multa ol dek mil, se ni konsideras la venditajn lernolibrojn kaj vortarojn. Versajne la duono de la asocioj vivas en la Baltaj landoj.

Ĉu eblas, ke mi tre mĝeste kalkulis? Jen kial. En decembro iun matenon T. Vasko, ĉefsekretario de HEA, donis intervjuon al la radio. Interalie li diris, ke en Hungario la nombro de tiuj, kiuj komprenas kaj povas komprenigi sin en Esperanto, estas ĉ. ses- ĝis sepdek mil. Laŭ la statistiko en STARTO la proksimuma membraro en Hungario estas 6.500. Nu, kiom diri? Se la situacio estas la sama en la aliaj socialismaj landoj kiel en Hungario, ĉu oni povas paroli pri pli ol kvarcent mil esperantistoj en la ses socialismaj landoj?

Ho, se nur la duono estus asocioj kaj ties duono abonus gazetojn kaj ties duono acetus nur unu libron jare! Ja la esperantistoj jam delonge ne estas "la leganta popolo", ankaŭ ili estas nuntempuloj kaj la televido, la tekniko ankaŭ ilin infektis. Kvankam estas bone sciite, ke Esperanton bone alproprigi, ellerni eblas nur per multa legado. Tre gravas la radioaŭskultado /esperantlingvaj programoj/, diskoj, sonbendoj. La ofta parolado "en Esperantujo" kiel ĉe aliaj lingvoj, bedaŭrinde ne staras je nia dispono.

Ĉu disvastigi Esperanton aŭ nur uzi ĝin? Stranga demando, ĉu ne? Tamen, kiu observas la nunan situacion de Esperanto,

facile povas konstati, ke en kelkaj landoj la disvastigo de Esperanto malrapidigis, sed en tiuj kaj en aliaj landoj for-
tikiĝis ĝia uzo fare de la ŝtato. Jen alia fakto. La ŝtato
uzas Esperanton kiel aliajn lingvojn, do rekonas ĝian lingva-
van egalrajtecon /radiodisaidigoj, politikaj, ekonomiaj el-
donaĵoj, prilandaĵ informiloj, literaturaj verkoj, antologi-
oj ktp./ sed - kaj tio tre gravas - , ĝi ne helpas la disvas-
tigon de Esperanto /en sia gazetaro, ne eldonas nacilingvajn
por- kaj priesperantajn informilojn, propagandilojn, la sama
radio disaidigas dum horoj en Esperanto, sed ne parolas dum
dek minutoj almenaŭ ĉiusemajne pri Esperanto naĉilingve/.
Kompreneble la uzo de la lingvo en la radiodisaidigoj estas
eĝe grava, sed pri tio scias nur la esperantistoj ĉu enlande
ĉu eksterlande. Kaj... por la "uzo" sufiĉas nur "elito" /ver-
kistoj, tradukistoj, lingvistoj/ kaj superfluas la enlanda
"amaso". El la supre diritaj faktoj sekvas, ke la disvastigo
de nia lingvo restos la deĵo de la esperantistoj, pli ĝuste
tiu de la landaj asocioj. Kaj... al tio estus tre necesaj la
amaskomunikiloj: naciaj gazetaro, radiofonio, televido. Sed
kiel?

Pri ĉio ĉi la esperantistoj devus pensadi, serĉi solvojn,
komune diskuti la eblojn kaj ne atendi miraklon, ĉar ĉi tiu
direkto de la evoluo por Esperanto estas danĝera.

La politikaj gvidantoj de la socialismaj landoj por la
ekonomiaj celoj serĉas novajn, pli efikajn vojojn, precipe
"pli rezultan kunlaboron". Jen sekvinda ekzemplo por la elek-
titaj asociaj gvidantoj kaj ... por la 81,5 pagitaj oficistoj.

D-ro István Nagy

ni recenzas

Surprizo post tridek jaroj

La poeto Nacia Artisto Petr Bezruč /1867 - 1958/ estas
la plej ofte tradukata ĉeĥa poeto, kies poemoj aperis jam en
pli ol 30 lingvoj. En kelkajn - nome la japanan, ĉinan, mal-
tan kaj aliajn ili eniris danke al Esperanto, kiu en tiu ĉi
okazo roĥis kiel pontlingvo. Tiu ĉi grava merito de Esperanto
estas jam longajn jarojn konata - ĉefe inter la fakuloj - kaj
ankau ĝerioze aprezata. Lastjare estis vico de ĝisnunaj atin-
goj riĉigita je nova sukceso: ĉinlingva eldono de la tuta po-
emaro "Sileziaj Kantoj".

La libron eldonis la Fremdliteratura eldonejo en Pekino,
ĝi enhavas 228 paĝojn kaj du komencajn ilustraĵojn. La Espe-
ranta version - kun konsento de la aŭtoro mem - preparis D-ro
Tomáš Pumpř kaj Ota Ginz. Petr Bezruč kun ioma skeptikq espri-
miĝis pri ebleco traduki poemojn el "Sileziaj Kantoj" ĉinen
Ĥelpe de la Internacia Lingvo, sed malgrau tio li skribis spe-
cialan dediĉoversaron por la ĉinaj legantoj, kiun li enmanigis

al D-ro T. Pumpr. /Bedaŭrinde, la korespondaĵo inter T. Pumpr kaj P. Bezruč pri tiu ĉi afero en originalo ne konserviĝis./ La dediĉoversaro estas en la libro publikigita en la ĉeĥa originalo kaj en la ĉina traduko. La libron kompletigas foto-grafaĵo de P. Bezruč kaj bibliografiaj notoj.

El la Esperanta versio tradukis la poemaron en la ĉinan lingvon samideano Lau Gong kaj la libro estis preskau prespreta jam en la jaro 1953. Poste en Ĉinio alvenis tempo, kiu mal-ebligis finan aperon de la eldonaĵo - nur post 30 jaroj la ideo ne nur maturiĝis, sed ankaŭ sukcese efektiviĝis. Je la freŝa eldonaĵo kunlaboris ankaŭ esperantisto Sun Gong, kiu poluris la finan tekston laŭ la ĉeĥa originalo. Eble la eldonintoj ne rimarkis, ke la poemaro "Sileziaj Kantoj" jam plene aperis en Esperanto en la jaro 1970 en majstraj tradukoj de triopo Pumpr-Hromada-Kořínek.

La novaperintan libron oni jam prizorgis por kolektaĵoj de Memordomo de Petr Bezruč - t.e. muzeo de Bezruč en Opava.

V. K.

/La Esperanto-redakcio de Radio Vieno afable disponigis al ni ĵenan recenzon, elsenditan la 13-an de januaro 1985:/

Sindefendologiaj studoj

Kvazaŭ daŭrigo de "La transdorsoĵeto" estas eldonita la broŝuro "Sindefendologiaj studoj", verkita de ing. Jindřich Novák, kunautoru ankaŭ de la unuonoma libreto. La eksplikoj de la ajnaj batalpozicioj estas skribe kaj skize dokumentitaj per trafaj klarigoj, al spertaj legemuloj kompreneblaj. Por pli detale enpenetri la enhavon, estas necese mencii la avertojn, kiujn oni praktikas en diversaj batalsportoj /judo, klasika lukto, liberstila lukto au la sinprotekto/. Oni provas analizi la unuopajn ĵudoĵetojn, tangantajn kaj aksofortajn, sferojn de taktiko, mensa sinpreparo, scio pri sentiva loko de kontraŭulo kaj tiel plu.

Granda parto de la enhavo estas dediĉita al la temo

1. forto tanganta, tio estas forto, kiu efikas sub la turno-akso de la ĵetato kaj horizontaligas lin,
2. kiamaniere generi la forton tangantan,
3. la bezona grandeco de tiu ĉi forto, krome diversaj arĥetipoj de avertoj, tio estas fundamentaj principoj de batalagoj, kiujn oni ŝuu post la alia en kelkaj ĉapitroj ĝisfunde pritraktas. Ankaŭ oni mencias la plej gravajn klasojn de la avertoj, diferencon inter la svepoĵetoj /tio estas per sia propra gambo forigi la gambojn de la kontraŭulo/, pri rulĵetoj kaj ilia meĥanismo kaj fine pri la tempobalancoj por ties plenumo.

Ke en tiu sporta fako oni aplikas terminojn, ne renkonteblaj en la ĉiutaga lingvouzo, iom malfaciligas la ĝuon dum la legado kaj, kvankam post ĉiu ĉapitro estas aldonita vortareto, kiu alproksimigu kaj plifaciligu la komprenon, la paci-

enco de la leganto estas tamen ege streĉata pro abundo de la, por normala lingvopraktikanto troviganta vorttrezoro.

Sed ni Esperantistoj, avide sekvantaj la pliriĉigon de la fakliteratura disvastigo, ne preterlasu la okazon perfektigi nian scion per studo de tiu ĉi verketo kaj similaj, en baldāua estonto certe sekvantaj prezentaĵoj.

Johann Bronec

DISKRIMINACIO

DISKRIMINACIO estas kolekto de 1. a. 23 prelegoj kaj komentarioj pri la kongresa temo de la 65-a Universala Kongreso de Esperanto, Stokholmo, aranĝitaj de d-ro Renato Corsetti. La teknika plano de la libro estas laŭ avangarda maniero. Ĝi estas en broŝura formo, kun nigra kaj ruĝa kovrilo, speciale desegnita de Peter Oliver. La formato estas A 5 /210 mm/ kun 175 pagoj. Prezo 21,00 gld.

DISKRIMINACIO traktas la radikojn de diskriminacio, diskriminacion kontraŭ etnoj kaj rasoj, internacian ekonomian diskriminacion, diskriminacion kontraŭ virinoj, diskriminacion pro seksa orientiĝo aŭ religio, maldiskriminacion kaj lingvan diskriminacion.

Kontribuis 1. a. John Wells /Britio/, Probal Dashgupta /Hinda Unio/, Uwe Moritz /FR Germanio/, Guy Héraud /Francio/, Ante Ferencić /Jugoslavio/, Werner Bormann /FR Germanio/, Anna Brennan /Italio/, Birgitta Wistrand /Svedio/, Jila Sadigi /Irano/, B. kaj R. Eakins /Usono/, Luisa Hoffmann /FR Germanio/, Pieter de Graaff /Nederlando/, Albert Goodheir /Britio/, Zeng Heyao /Ĉinio/, Umeda Yosimi /Japanio/ kaj Nikolai Zubkov /Sovetunio/.

La Esperanto-movado kontraŭbatalas la lingvan kaj kulturen diskriminacion. DISKRIMINACIO diskutigas kaj klerigas ankau pri aliaj diskriminacioj. Tiel ĝi invitas al pliaj kontaktoj kaj kunlaboro inter la Esperanto-movado kaj organizaĵoj, kiuj aktive kontraŭas tiujn aliajn specojn de diskriminacio. Por tia plua agado DISKRIMINACIO donas konkretajn proponojn.

-UEA-

DUA DISERTACIO PRI INTERLINGVISTIKO DE BLANKE

En la jaro 1976 Detlev Blanke /Berlin, GDR/ doktoriĝis per disertacio pri komparo de la vortfarado de la germana lingvo kaj Esperanto. La titolon "doctor scientiae philosophiae" /Dr. sc. phil./ li akiris per defendo de dua doktora disertacio la 13-an de februaro 1985. Ĝi havas la titolon "Bazaj demandoj de la evoluo de planlingvoj - sub aparta konsidero de Esperanto".

La Senato de la Scienca Konsilantaro de Humboldt-Universitato Berlin akceptis la laboraĵon kiel "disertacion B", t.e. en kelkaj landoj "habilitacia disertacio" aŭ disertacio por fariĝi "doktoro de sciencoj" /Soveta Unio/ aŭ "Kandidato

de sciencoj" /Hungario, ĈSSR/. Per tiu en GDR plej alta scienca grado al la sukcesinto estas principe malferma ĉiu scienca universitata aŭ akademia kariero - se ekzistas ŝtata intereso pri la fako.

La ekspertizojn verkis la universitataj profesoroj Georg Friedrich Meier /komunikad-scienco, ĝenerala lingvistiko, Humboldt-Universitato/, Johannes Klare /romanistiko, Humboldt-Universitato/ kaj Frank Häusler /slavistiko, Pedagogia Altlernejo Magdeburg/. Versajne la unuan fojon en la historio de lingvoscienco oni donis tiun gradon por la fako "interlingvistiko". Per tio - almenaŭ nomenklature - oni kreis precedentan kazon.

La disertacio konsistas el du volumoj: I: la teksto /417 + 2 p./, II: notaro /pli ol 500 notoj/ kaj 2000-titola bibliografio ordigita laŭ 23 sekcioj /kun materialo i.a. el 280 etnolingvaj kaj planlingvaj revuoj/.

La sama teksto aperos sub la titolo "Plansprachen in Theorie und Praxis" /planlingvoj en teorio kaj praktiko/ 1985 en Akademie-Verlag Berlin /mendo-numero 7535643/ kaj internacie estos mendebla per la kutimaj libroeksportaj vojoj, aŭ ĉe UEA kaj GDREA. Prezo: ĉirkaŭ 25 markoj. En GDR mendojn akceptas la kutimaj librovendejoj. Valoras substreki, ke temas pri libro traktanta neprecipe Esperanton, sed precipe la planlingvistikon.^{2/}

Ĉirkaŭ 75 % de la tekstoj traktas la planlingvan fenomenon kun siaj diversaj aspektoj kaj nur 25 % aparte Esperanton. 33 % de la bibliografio entenas esperantologiajn titolojn.

La aŭtoro klopodis kritike prilabori kaj utiligi la ĉefan internacie akireblan materialon ĝis fino de 1983.

Elirante de la rilatoj inter lingvoplanado kaj planlingvo li traktas la "artefaritan" aŭ la "konscian" en la lingvoevoluo, tre detale diskutas la diversajn terminojn /pli ol 20/ ĉirkaŭ la ĉefa termino "planlingvo" kaj prezentas konsiderojn kaj materialojn pri la nombro kaj ĉefaj motivoj de la ekzisto de planlingvoj. Detala ĉapitro prezentas la kontraŭdirajn kriteriojn de lingvistoj, laŭ kiuj oni konstruu planlingvojn. Diversaj klasifikoj estas kritike prezentataj kaj kompletigataj per la klasifiko "laŭ komunikada funkcio" /planlingvaj projektoj, semiplanlingvoj, planlingvo /=Esperanto//.

Sekvas traktado de ĉefaj pazigrafioj, aprioriaj kaj aposterioriaj planlingvaj projektoj /resp. semiplanlingvoj/ kaj Volapuko. Aparte detale estas traktitaj la sistemoj de la naturalisma skolo kaj tre detale laŭ originalaj dokumentoj - la historio de International Auxiliary Language Association /IALA/. 100 paĝoj traktas pri Esperanto, la lingvopolitika rolo de Zamenhof, la strukturo kaj lingvaj ecoj de Esperanto /grafemoj, fonemoj, morfemaro, vortfarado, vorto kaj signifo, strukturo de la leksiko, sintakso, lingvo-tavoloj kaj stiloj, evoluo-stabileco-normo/, lingva komunumo de Esperanto kaj apliko de Esperanto en la praktiko. Tre mallonga ĉapitro pri la rilatoj inter planlingvoj kaj interlingvistiko finas la libron.

La traktado de la ĉefaj planlingvaj sistemoj akcentas pli forte - ol ĝis nun farite - la komunikadan funkcion kaj aliajn socilingvistikajn aspektojn de la planlingvaj movadetoj.

Sendube la ĉapitro pri Esperanto devintos esti pli ampleksa. Sed drasta spaclimigo tion malhelpis. Eventuale la libro efikos stimuliĝe tiel, ke la eldonejo pretos publikigi apartan monografion pri Esperanto. Jam ekzistas flanke de la eldonejo konsideroj por traduko alinacilingven.

La libro estas aparte riĉe bibliografiata pro du kaŭzoj: a/ La temo en nacilingvaj medioj renkontas ofte skeptikecon. Detala utiligo kaj prezento de faka literaturo montras la maturecon de la temo. b/ Se jam por informitaj interlingvistoj kaj esperantologoj ofte estas nekonataj multaj tre specialaj valoraj studoj, des pli nekonataj ili estas por nove interestigataj sciencistoj, laborantaj en nacilingva medio. Ili havos rapidan starton pro la pretigita kaj tralaborita bibliografio, verŝajne la plej ampleksa kaj plej moderna aktuale internacie skirebla. La aŭtoro planas prilabori multe pli ampleksan bibliografion surbaze de sia 6000-titola sliparo.

1/ Presita: Detlev Blanke: Plansprache und Nationalsprache. Einige Probleme de Woertbildung des Esperanto und des Deutschen in konfrontativer Darstellung. Linguistische Studien, Reihe A, Arbeitsberichte, Nr. 85, Akademie der Wissenschaften der DDR, Zentralinstitut für Sprachwissenschaft, Berlin 1982, 161 p. Havebla ĉe UEA.

2/ La libro estas mendebla en socialismaj landoj en la librovendejoj por fremdlingva literaturo, en aliaj landoj oni sin direktu al internacia libro-vendejo aŭ rekte al Buchexport, Volkseigener Aussenhandelsbetrieb de DDR, 7010 Leipzig, Leninstrasse 16. Esperantistoj povas ĝin mendi ankaŭ ĉe UEA.

"Balado pri Ĉe-instruisto" kiel opereto

El la sovetia Samarkando atingis min interesa informo. Esperanto-kursanoj de mezgrada muziklernejo prezentis dum regiona renkontigo "Foirfestan kanton pri Esperanto-instruisto" de Tomáš Pumpr /en "Esperantista" presita kun la titolo "Balado pri Ĉe-instruisto"/ en formo de o p e r e t o . - La muzikon komponis la muzik-studentoj. Ĝi estis granda sukceso, multaj surbendigis ĝin.

Nun venis en Pragon peto pri Esperantaj tradukoj de ĉefaj operoj ĉele de ilia prezento en Samarkando. /J.M/

Universitata disertacio pri Esperantaj libraroj

En junio 1984 Elsonora Worsztynowicz prezentis ĉe la Universitato de Poznań sian licencian disertacion s.t. "Kolektoj de Esperantaj eldonaĵoj". Tiu 180-paga disertacio, kiun alte aprezis Librosocia Instituto kaj polaj esperantologoj, dĝnas multflankan analizon laŭ historio kaj nuna stato, kaj ankaŭ eltiras konkludojn por estonto lige kun centjarigo de Esperan-

to. Adreso de la aŭtorino: Eleonora Worsztynowicz, ul. Poznańska 26/37, PL 63-100 Ś r e m , Pollando.

KONFERENCO ESPLORAS LINGVAN PROBLEMON

La 3-a jara konferenco "Lingvo kaj Komunikado" estis organizita de CED /Centre de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-problemo/ en Nov-Jorko la 14-an de decembro. Ĉi-jare la konferenco teme estis "Lingva planado je internacia nivelo". Inaŭguris la unutagan konferencon s-ino Françoise Cestac, estrino de la Traduka Servo de Unuigintaj Nacioj. Ses-deke da partoprenantoj sekvis kun intereso dek tri referaĵojn, faritajn de altaj funkciuloj de UN, de usonaj universitataj profesoroj kaj de tradukistoj kaj lingvistoj de Usono, Kanado kaj la Europa Komunumo.

Pluraj referaĵoj traktis la terminologiajn problemojn, ĉefe tiu de Marie-Josée Jastrab, franca terminologo ĉe UN. Diversaj specialistoj skizis la problemojn pri varbado kaj trejnado de funkciuloj por plenumi la multlingvajn bezonojn de la internaciaj organizaĵoj.

Ĉi tiu konferenco, kiu fa-

rigis tradicia, havis tamen novaĵojn - la partoprenon de du prelegantoj vojaĝintaj el Eŭropo. Revizoro ĉe la Traduka Servo de la Europa Komunumo en Luksemburge, B. Moon, priskribis la klopodojn por konservi la plurlingvismon ĉe la Europa Komunumo. A. olde Kalter, lingvisto de la firmao "Buro voor Systeemontwikkeling" /BSO/ en Utrecht, Nederlando, prezentis la nunan staton de la esploroj cele al DLT - aŭtomata traduk-sistemo pere de pont-lingvo bazita sur Esperanto.

Akcepte okaze de la datreveno de la naskiĝtago de d-ro L. L. ZAMENHOF /la kreinto de la Internacia Lingvo, Esperanto/ fine de la tago kunvenigis la partoprenintojn de la konferenco kaj la membrojn de la Esperanto-Klubo de Nov-Jorko.

-UEA-

Pli ol 40 000 bibliotekoj kaj ties filioj estas en nia lando. Ili disponas pri 180 milionoj da volumoj kaj preskaŭ 6 milionoj da legantoj uzas la servojn de la Unueca Sistemo de Bibliotekoj. Al la plej gravaj apartenas 19 sciencaj kun 30 milionoj da volumoj kaj 74 altlernejoj kun 1610 filioj, kies libro-fonduso konsistas el 13 milionoj da publikaĵoj. Gravan reton formas ankaŭ fakaj bibliotekoj, da kiuj estas pli ol 8 000. Al la Unueca Sistemo apartenas ankaŭ bibliotekoj de Ĉeĥoslovaka Akademio de Sciencoj, bibliotekoj agrikulturaj, higienaj, teknikaj, lernejoj, padeagogiaj, arkivaj, bibliotekoj de muzeoj, galerioj ktp. Specifa estas la pozicio de teknikaj bibliotekoj, kiuj estas samtempe la fundamenta parto de la Sistemo de Sciencoteknikaj kaj Ekonomiaj Informoj. La plej ampleksa reto estas tiu de la popolaj/publikaj bibliotekoj, kiuj kun siaj filioj estas pli ol 12000.

St.

FAMAJ HOMOJ EN TRAJNO

Albert Einstein

La fama sciencisto, malkovrinto de teorio de la relativeco, profesoro Albert Einstein /Ajnŝtajn/ estis malgrau sia bonfamo homo tre modesta kaj eĉ timema. Oni bone sciis tion pri li.

"Mi deziras nenion pli ol angulon sen bruo, kie mi povus trankvile labori kaj kie neniu ĝenus min," li eksopiris foje. Sed tiu ĉi deziro neniam plenumiĝis. La homoj pri la plej fama fizikisto de ĉiuj tempoj ne ĉesis interesiĝi kaj la famo akompanis lin ĉiupase, kvankam li ne sopiris pri ĝi kaj ofte li lauvorte strebis forkuri antaŭ ĝi.

Foje dum unu el siaj triumfaj vojaĝoj tra la mondo, dum kiu oni ĉie bonvenigis kaj ovaciis lin, li diris al sia edzino: "Faru kiel vi volas, sed mi vojaĝos en la tria klaso."

Kaj li vojaĝis.

Saša Raŝilov

La fama ĉeĥa komika aktoro Saša Raŝilov foje gastrolis en provinco. La teatraĵo daŭris tro longe, li do sukcesis post la prezentado eĉ ne alivesti sin. Penplene li sukcesis en la lasta momento alkuri al la trajno kaj enyagoniĝi. Sur la kolo li ankoraŭ surhavis la pastran kolumon, ĉar li tiuvespere rolis kiel pastro.

Tuj post kiam li envenis kupeon, alrapidis iu sinjorino, viŝis la sidbenkon kaj kisis lian manon.

"Estu laŭdata Jesuo Kristo, via sacerdota moŝto, kien vi veturas tiom malfrue?"

Raŝilov kliniĝis al la maljunulino kaj kriegis en ŝian orelon: "Al Prago mi veturas, panjo, al Prago. Al amorantinoj."

La maljunulino konsterniĝis kaj ne estis jam tiom parolema.

Kiam la trajno proksimiĝis al Prago, foriris Raŝilov kun kofreto, en kiu li havis civilan vestaĵon, al tualetejo, kie li sangis la vestojn. Li revenis kiel civilulo en la kupeon kaj volis sidigi sur sia sidloko.

"Tiu ĉi estas okupita," diris al li la maljunulino, kiu ne rekonis lin. "Tie ĉi sidas lia pastra moŝto!"

"Nepre ne," ekpiknis Raŝilov, "lia pastra moŝto falis en necesejon, nun tie ĉi sidas mi!"

Jaroslav Kocian

Foje vojaĝis la fama ĉeĥa violonisto Jaroslav Kocian el Parizo al ĉeĥa urbo Písek viziti profesoron Ševčík. Estis tie

okazonta iu solena renkontiĝo de la disĉiploj de Ŝevĉik.

En Plzen li transvagoniĝis en trajnon veturonta al Písek kaj tuj post kiam li ekkomfortis en la kupeo, li ekdormis. Verkiginte li elrigardis tra fenestro kaj miregis. La trajno statis ankoraŭ en fervojstacio Plzen.

Li elvagoniĝis al perono, trovis la konduktoron kaj iomete kolerigite vortatakis lin, kiam la trajno fine ekveturos.

"Homo malfeliĉa, kiamaniere vi envagoniĝis en tiun ĉi trajnon?" skuis la kapon la konduktoro. "Ja tiu ĉi trajno forveturos al Písek nur post tri horoj!" Tio eĉ pli kolerigis Kocian.

"Sed tio ja ne estas ebla," ekscitiĝis li. "Antaŭ momento mi entrajniĝis kaj ĝuste vi diris al mi, ke ni ekveturos post dekkvin minutoj!"

La konduktoro enpensiĝis, denove okulumis Kocian kaj ekfrapis sian frunton.

"Do estas vi," li diris. "Mi do diros al vi ion. Vi iomete dormis, veturis kun ni al Písek kaj en la sama vagonaro vi kune kun ni revenis al Plzen."

Kocian elpoŝigis poŝhorloĝon kaj nur rezigne ekĝemis: "Malbeninde, vi pravas, eble tiele okazis."

A. P. Borodin

La fama rusa komponisto Aleksandro Porfirjeviĉ Borodin estis ne nur komponisto, sed ankau sciencisto kaj kuracisto. Eble pro tio li estis ofte malatentema kaj forgesema.

Foje li vojaĝis kun sia edzino per trajno eksterlanden. Dum pasporta kontrolo la doganisto pridemandis lin.

"Kie estas via edzino, ke mi ne vidas ŝin ĉi tie?"

"Ŝi foriris en koridoron spiri la freŝan aeron."

"Kaj kian baptonomon via edzino havas?" demandis la ofiĉisto preterpase antaŭ la foriro.

La komponisto, ekscitita pro trapaso de la landlimo, neniamaniere povis rememori. Li nur embarase staris kaj silentis.

"Ĉu vi ne scias tion?" la doganisto fariĝis suspektema. "Kion mi pensu pri tio?"

En tiu momento bonŝance revenis kupeon edzino de Borodin. La komponisto etendis la brakojn al ŝi kaj malespere ekvokis: "Por Dio, Katarinjo, kiel vi verdire nomigas?"

Mark Twain

Okazie foje, kiam la usona humoristo Mark Twain estis ankoraŭ tre junaga, ke li vojaĝis ien per trajno. Li sidis en la kupeo kun libro enmane, kontraue sidis la rica fabrikposedanto kun edzino kaj filino.

"Belega pejzaĝo," la nekonatulo provis komenci la babildon.

Mark Twain silentis.

"Eble vi legas ion tre interesan?"

Mark Twain modere kapjesis.

"Aŭ vi eble studas? Bonege, juna viro!"

Mark Twain denove silentis.

"Ĉu mi povas proponi al vi cigaron?"

"Dankon, mi ne fumas."

"Tio ja estas laŭdinda! Do ĉu glaseton da viskio?"

"Dankon, mi neniam drinkas."

"Tio ja ne estas ebla!" ekĝemis ĝojege la fabrikanto. "Vi ja estas modelo de ĉiuj virtoj! Permesu al mi interkonatigi vin kun miaj edzino kaj filino."

"Dankon," rifuzis ĝentile eĉ tiun ĉi honorigon Mark Twain, "mi ankoraŭ neniam amis."

Esperantigis J. Tomášek

Adeptoj de la Ordeno de rideto.

Kiam mi legas, ke tiu aŭ alia artisto aŭ famulo estis honorigita per "Ordeno de la infana rideto", mi ĉiam opinias, kiel laŭdinda kaj grandioza tio estas. Kaj mi iomete envias al la infanoj, ke nur ili rajtas honorigi iun per tiu ĉi ordemo.

Ni nur ĉirkaŭrigardu, kiel unika gasto estas rideto ofte en tumulto de la ordinara tago ĉe ni plenkreskuloj! Eble tio estas supermezura rapido kaj tumulto en ĉiu nia agado, kiuj devigas nin esti koleremaj kaj malbonhumoraj unu al la alia, al tio, ke ni ĉiam estas preparitaj murmuri pro io, eldiri malafablaĵojn, ke ni ĉiam vidas unue nin mem. Tio /onidire/ estas la vivo...

Nek ni, laborentoj en trafiko, estas aliaj. Ofte eĉ pli malbonaj, ĉar mi dum streĝa laboro kaj dum plenumo de la multaj devoj renkontas eble ĉiujn formojn de rapido kaj tumulto, konfuzo kaj demandoj, necerteco kaj senpovo, malĝentileco eĉ egoismo. En tiu ĉi tumulto estas ofte vera arto konservi la trankvilon, havi resuman ideon kaj precipe komprenemon por malfacilaĵoj de aliuloj. Kelkfoje mi vidis fervojiston trakanta aliulon el pozo de genato, kaj do neafable, malvolonte eĉ brutale. Kiam oni jam estas devigata helpi en io, tiam oni povoscias tion konvene spici, por ke la koncernulo ekkomprenu, kiam "favoron" li ricevas.

Dee pli rara kaj agrabla estas aliro de tiuj, por kiuj afableco kaj rideto estas memkomprenebla parto de ilia laboro. Foje sufiĉas, se oni al tia homo diras kelkajn afablajn vortojn kaj en ĉirkaŭa mondo kvazau serenigas. Al la rideto

oni respondu per rideto kaj oni kun surprizo konstatos, ke tio verdire ne estas malfacilaĵo. Vere, estas multe pli malfacile respondi afable kaj kun rideto al malafablulo, al la homo malbonhumora. Sed ankaŭ tio eblas.

Pripensu ĉiu mem, kia li estas. Kvankam tio estos por multaj malfacila, strebu ĉiunomente kaj ĉiukaze esti bonhumoraj, helpemaj, afablaj, strebu, ke ni ĉiuj fariĝu adeptoj de la Ordeno de rideto.

-JT-

Familiaj Esperanto-kluboĵ por centjarigo de Esperanto!

Por omaĝi centjarigon de la internacia lingvo, membroj de la familio Worsztynowicz fondis familian Esperanto-klubon. Ĝis la jubilea jaro 1987 ili intencas atingi nombron de 100 familianoj flue parolantaj Esperanton.

La familio Worsztynowicz kompilas detalan genealogion de sia gento. Ĝia gentopatro estis la muelisto Tomaso Ŕrsztyn /Worsztyn/, kju en 1746 loksidiĝis en la urbo Gostyn /c. 80 km sude de Poznan/. Probable li venis el la okcidenta Eŭropo kaj lia origina nomo povis esti Ornstein au Wornstein, jam en 1761 aldoniĝis al lia nomo la finaĵo "-owicz".

En la 19-a jarcento la familia nomo estis ofte miĝe skribata kaj nuntempe diversaj branĉoj de tiu familio nomiĝas: Worsztynowicz, Burisztynowicz, Ŕrsztynowicz, Ostynowicz /Vorstinovic, Burstinovic, Orstinovic, Ostinovic/. Ĉiuj personoj kun tiuj nomoj vivantaj ie ajn en la mondo estas idoj de la muelisto Tomaso. Se logas ankaŭ en via regiono iu samnoma, kontaktigu lin kun la familio en Pollando. Sur genealogiaj tabeloj estas registritaj ankaŭ idoj en inaj linioj, tial multaj familianoj portas aliajn nomojn, tamen ĉiujn ligas deveno de la komuna gentopatro.

Ĉiujare multaj membroj de tiu gento partoprenas la Familian Feriadon "Esperanto hejme" en Międzygorze /en 1983 - 25 personoj, en 1984 - 40 personoj/ kaj jam pli ol 50 familianoj konas au lernas la internacian lingvon. En junio 1984 Eleonora Worsztynowicz prezentis ĉe la Universitato de Poznan disertaĉion pri Esperantaj bibliotekoj.

Nuntempe vivas ĉ. 4000 posteuloj de Tomaso apartenantaj al la sesa ĝis deka generacioj. Ili logas ĉefe en Pollando, sed ankaŭ en multaj aliaj landoj /Aŭstralio, Britio, Francio, FRG, GDR, Kanado, Usono k.a./. Personoj, kies antaŭuloj ĉ. 1900 elmigris el Pollando, plejparte ne konas la polan lingvon.

Ĉu ie en la mondo ekzistas familioj, kiuj kompilas siajn genealogiojn kaj intencas fondi familiajn Esperanto-kluboĵn? La familio Worsztynowicz volonte renkontigos en Międzygorze kun ili. Adreso: Familio Worsztynowicz, P.O. Kesto 311, PL 50-950 Wrocław 2, Pollando.

ST-SEKCIO

El raporto pri la agado de Scienca-teĥnika sekcio de ĈEA en la jaro 1984.

Scienca-teĥnika sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio /STS ĈEA/ en la jaro 1984 havis 158 membrojn. Laboron de STS ĈEA gvidis 5-membra komitato: prezidanto estas Doc. D-ro Vlastimil Novobilský, CSc., vicprezidanto D-ro Ing. Ludvík Fritsch, sekretario Jiří Laube, komitatanoj Ing. Zdeněk Pluhař kaj František Hort. La komitato kunvenis la 1-an de septembro 1984 okaze de seminario AEST '84 en Brno. Tie okazis ankaŭ kunsido de STS ĈEA, en ĉeesto de eksterlandaj partoprenantoj de la seminario. La ĉeestantoj audis raporton de la prezidanto pri la farita laboro kaj proponon de la laborplano por la jaro 1985. Per balotado de la membraro la gisnuna komitato estis largigita per s-ano Karel Kraft, kiu laboras kiel redaktoro de la fakaj eldonaĵoj de STS ĈEA.

En la kadro de STS ĈEA aktivas jenaj fakaj grupoj: komputista, agrokultura, de aviado, de radioamatoroj kaj pri botaniko. Formiĝas pluaj fakaj grupoj: pri akustiko kaj pri godezio. Krom la fakaj grupoj, kiuj laboras pli-malpli kolektive, aktivas en aliaj terenoj unuopaj fakuloj, kiuj laboras individue aŭ partoprenas laboron en internaciaj laborgrupoj.

Dum la tagoj 1984-08-31/09-02 STS ĈEA aranĝis en Brno internacian seminarion pri apliko de Esperanto en la scienco kaj teĥniko AEST '84 kun la ĉeftemo "Perspektivoj de la monda nutraĵ-produktado". Krom la ĉefa temo oni traktis problemojn de la faka Esperanto. La seminarion partoprenis pli ol 100 personoj el 9 landoj; ili ricevis libron kun 21 seminarioj prelegoj sur 175 paĝoj /mendebla ĉe Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská 10, CS-110 01 Praha 1, por 30 Kčs/.

Krom la prelegkolekto AEST '84 aperis ankaŭ "Ĉeĥa literaturo en Esperanto" de Vlastimil Novobilský. Temas pri bibliografio de Esperantaj verkoj far ĉeĥaj aŭtoroj /mendebla ĉe ĈEA por 9 Kčs/.

Estas preparataj jenaj vortaroj kaj terminaroj:

JUDr Karel Traxler: Jura vortaro Eo-Cs, Cs-Eo
František Hort: Terminaro de duonkonduktiloj /Eo, Cs, Sk, E, D, F, R/
František Hort: Elektroteĥnika vortaro /Eo-Cs-Eo/
Ing. Jan Werner: Matematika vortaro Eo-Cs, Cs-Eo
Ing. Jan Werner: Konstrufaka kaj arkitektura vortaro /Eo-Cs/
František Mlynář: Systematická botanika /Cs-Eo vortaro de plantoj/, la sama aŭtoro preparas vicon da aliaj vortaroj, kiel Morfologio de plantoj, Hortikultura kaj pomologia vortaro, Helpa vortaro por botaniko k.a.
Ing. Jan Pospíšil: Aeronautika terminaro, plurlingva
Ján Mužlay, Ing. Július Varinský: Maŝinelementoj /lernolibro/
Miroslav Baroš: Názvosloví akustiky /Terminologio de akustiko
- ČSN 01 1600/

Jan Rybář: Terminologio de gis-fako
Josef Tylš: Agrikultura vortaro
Jaroslav David: Ĝardenista vortaro
Antonín Bombionka: Vortaro de birdoj /7-lingva/
Estas malnete preta la Esperanta-ĉeĥa-germana parto de la fer-
vojistaj vortaro.

Membroj de STS ĈEA kunlaboras kun la Terminologia sekcio de SEC Budapeŝto kaj havas kontaktojn kun la Scienca-teĥnika komisiono de Estraro de Esperanto-Asocio en GDR, kun Kuba Esperanto-Asocio, kun Domo de sciencistoj en Leningrado k.a.

Ing. Petr Chrdle partoprenis la 36-an IFEF-kongreson en Sljanĉev Brjag, Bulgario, en majo 1984, per prelego: Fervoja esplorinstituto en Prago kaj ĝia internacia kunlaboro.

Konferencon en Domo de sciencistoj en Leningrado, junio 1984, perletere partoprenis Jiří Laube per kontribuajo: Esperanto, scienco kaj paco.

En internacia seminario "Umwelt hat keine Grenzen" /La vivomedio ne havas limojn/ en Wiesenfelden, FRG, 1984-11-30/12-02, prelegis D-ro Vl. Novobilský, CSc., kaj Ing. Zd.Polák.

Ĉeĥlingvan prelegon "Eblecoj de eluzo de Esperanto en radioteĥnika kaj komputado" havis Ing. P. Chrdle en filio de Ĉeĥoslovaka Scienc-teĥnika Societo de Esplorinstituto por radio kaj televido, Praha, en oktobro 1984.

Kadre de la 6-a renkontigo de esperantistoj pac-defendantoj en Pardubice, ĈSSR, okazis la 23-an de marto 1984 internacia dialogo pri la temo "Scienco - teĥniko - paco". Prezidis ĝin D-ro V. Novobilský.

Krome membroj de la sekcio publikigis, redaktis kaj kontrolis vicon de fakaj kaj informaj tekstoj. Ekz. Ing. Z. Fluhaĥ aperigis artikolojn en Sano - Medicina informilo de ĈEA pri Modernaj ĥemianalizaj metodoj en medicino. Krome li kunredaktis la ĥemian numeron de Sciencaj komunikajoj 1984 /Budapeŝto/. Ing. Josef Vojáček verkis multajn ĉeĥlingvajn artikolojn pri Esperanto kaj komputado en fakaj revuoj Automatizace, Sĉelovaci technika kaj Mechanizace a automatizace administrativy.

El laborplano de la Scienca-teĥnika sekcio de ĈEA por la jaro 1985 ni elektas jenajn erojn:

- preparlaboroj por fondo de interlingvistika fakgrupo
- organiza preparo de terminologia kurso okazonta en 1986
- publikigo de studmaterialoj por la terminologia kurso
- preparo de interlingvistika seminario /konferenco/ honore al centjarigo de Esperanto en 1987
- publikiga aktiveco de STS ĈEA en 1985: Jan Werner: Matematika terminaro, Jan Werner: Terminologia manlibro, Aleš Bednařík kaj kol.: Tehnika vortaro - ciklostilita eldono
- studi eblon de reeldonado de la iama "STS informas" por la membroj de STS ĈEA kaj aliaj interesatoj
- daŭre kompletigadi la sekcian fakajn bibliotekojn kaj stimuli ĝian pli vastan utiligadon far la membroj.

Pedagogia sekcio | | | | | | | | | | | | | | | | | | | | | |

El la "Raporto pri la agado de la pedagogia sekcio en la jaro
1984"

- 1/ Instruado en la Somera Esperanto-Tendaro en Lančov.
En la 1-a etapo estis 10 kursoj, 136 lernantoj, la instru-
istestrino estis Věra Berandovská. Apud komencantoj estis
unu C-kurso. En la 2-a etapo: 12 kursoj, 125 lernantoj, la in-
struistestro Miroslav Malovec. Estis 8 A-kursoj, 2 B-kursoj,
1 C- kaj 1 D-kurso. En la 3-a etapo: 5 kursoj, 82 lernantoj,
la instruistestro Jan Jičínský. Estis 3 A-, 1 B- kaj 1 C-kur-
soj. La kursojn partoprenis ne nur enlandaj, sed ankaŭ ekster-
landaj studentoj.
- 2/ La asocia ekzameno okazis la 14-an de aprilo 1984 en Pardu-
bice. En la ekzameno pri scio sukcesis S. Antošová /Č. Bu-
dějovice/, K. Krejča /Praha/, J. Markovič /Hodonín/, V. Tárk
/Netolice/, en la instruista ekzameno: V. Davidová /Bludov/,
E. Hoffmannová, H. Štruncová kaj Ing. A. Vavrouš /ĉiuj el Pra-
ha/.
- 3/ La korespondan kurson gvidas 16 lektoroj, partoprenas 728
studentoj.
- 4/ La kursoj en lokaj grupoj okazis en Praha, Brno, Karlovy
Vary, České Budějovice, Olomouc, Znojmo, Hořice, Pardubice,
Opava kaj Písek.
- 5/ La kursoj en lernejoj aŭ pionir-domoj estis en Horka, Lito-
vel, Nový Bydžov, Příbor, Pardubice-Polabiny, Červená Voda,
Olomouc, Opava, Písek, Zahořany, Filozofia fakultato en O-
lomouc, Minista altlernejo en Ostrava.
- 6/ La sekcio havis 24 membrojn.
- 7/ Oni preparas jenajn instru-tekstojn:
Malovec: Gramatiko kaj konversaciaj tekstoj por Lančov
Trarigardo de la E-gramatiko en la ĉeĥa lingvo
Koresponda manlibro por pioniroj
Kunlaboro ĉe verkado de vortaro por la Ŝtata Peda-
gogia Eldonejo /SPN/
Jočasová: Instrutekstoj por studentoj kaj faklaborantoj
Berandovská: Lernolibro por memlernantoj
Spitz: Lernolibro por altlernejanoj
Lernolibro de la ĉeĥa lingvo por eksterlandaj e-istoj
Cink: Frazologia vortaro
Koresponda kurso por progresintoj
Hradil: Kunlaboro ĉe verkado de vortaro por SPN
Hršel: Redaktado de vortaro por SPN
Smejkal: Kurso por studentoj de filozofia fakultato
Polenský: Lernolibro por infanoj, anekdotoj.
- 8/ Publikigaj aktivecoj: Polenský /regula rubriko en Jihočeská
Pravda/, Spitz /artikolo por Cizí jazyky ve škole kaj Star-

to/, Štruncová /Bulteno de la Praga Klubo/, Rotrekl /Znojensko kaj Starto/, Škoda /loka ĵurnalo en Bučovice/, Barandovská, Kyr kaj Baroš /Cizí jazyky ve škole, t.e. gazeto Fremdaj lingvoj en la lernejo/, Karhan /Paco/, Hradil /Sano, Verda Familio/. Malovec /Starto, Paco, Juna Amiko/.

- 9/ Gvidado de lokaj grupoj: Polenský, Štruncová, Rotrekl, Haccura, Klement.
- 10/ Seminario de la sekcio en Lančov 29. 6. - 1. 7. 1984. Sep prelegantoj, 21 partoprenantoj. La tezoj de la prelegoj estis senditaj al la partoprenintoj. /Ili aperos ankau en Starto, en la sekvantaj numeroj - noto de la red./
- 11/ Prelegoj kaj aliaj aktivecoj: Spitz /prelego en la klubo Vítkovice/, Hradil /seminario en Mnichovo Hradiště/, Polák /prelego en AEST/, Jodasová /enkatalogigo de la biblioteko de la Praga Klubo, enkatalogigo de la E-literaturo en la Ŝtata biblioteko kaj de la Pedagogia literaturo en Prago/.
- 12/ Kunlaboro kun eksterlando: BEA - Instruista sekcio /abono de Informilo/, HEA /kunlaboro kun ilia pedagogia sekcio/.
- 13/ Pedagogia rubriko en Starto: ĝi ne estos regula, nur informo laŭ bezono.
- 14/ Preparo de pedagogia seminario 1985: la sekcia komitato preparas la enhavon kaj inviton de la sekcianoj, respondecas d-ro Škoda.
- 15/ Rimarkoj: Raporton pri sia pedagogia aktiveco sendis 23 membroj de la sekcio, al kiuj oni dankas. Necesas kompletigi la liston de membroj kaj membrigi ĉiujn, kiuj laboras kiel pedagogoj, kaj kiuj sukcesis en la instruista ekzameno. La sekcio dume ne kapablas certigi eldonon de la 3-a parto de la porinfana lernolibro de Prachař kaj porinfanan gazeton.

/Laŭ raporto de la sekcia prezidantino PhDr. Věra Barandovská/

V 1. ĉtvrletí 1985 zakončili úspěšně písemný kurs esperanta u lektorky H. Štruncové tito absolventi:

Luboš Janů, Světlá n. Sáz., Bradlo 952
Anna Kociánová, Bystřice p. Host., Zanklova 1270
Dagmar Kosíková, Brocno č. 6, Chčebuz
Iveta Havlátková, Písek, Píseckého 1415
PhDr. Hana Kmetíková, Praha 4, Sulická 120.

Všem co nejusrdečněji blahopřejeme!

Karaj samideanoj!

Mi tre bezonas Libreton "Poŝatlaso de la mondo". Kiu povas vendi ĝin al mi? Mia adreso: F. Frýbert, Poznańská 6, 616 00 Brno.

AL - SEKCIO

LABORPLANO

de Artliteratura sekcio de ĈEA por la jaro 1985/86.

Septembro 1985

- a/ Prozo kaj poezio - ilia diferencigo el vidpunkto de kreo-proceso /J. Karen/
- b/ Aprezo de kvarfolio /Literatura suplemento/ /J. Rumler, E. Urbanová/
- c/ Muzikigitaj poemoj kun gitara akompano /Jodasová - Pečený/

Oktobro 1985

- a/ Variaj formoj de la poemkreado kun praktikaj specimenoj el la ĉeĥa poezio /J. Karen/
- b/ Singro-stilo /J. Rumler/
- c/ Muzikigitaj poemoj /Jodasová - Pečený/

Novembro 1985

- a/ Prozo kaj poezio /daŭrigo/ - II-a etapo - poezio. Problemoj de la ligita kaj libera verso.
- b/ Pozitiva kaj negativa influo de rimouzado en poemoj /J. Karen/
- c/ Prezento de muzikigitaj poemoj kun akompano de gitaro /Jodasová - Pečený/

Februaro 1986

- a/ Problemoj de la traduko el Esperanto ĉeĥlingven /J. Karen/
- b/ Faka diskuto pri enhavo de la libro Jaro 2000 - lingvo kiel ponto kaj abismo /aŭtoroj Skácel, Zima/ - preparos S. Harman /certigos partoprenon de lingvosciencistoj/

Marto 1986

- a/ Problemoj de la traduko el Esperanto ĉeĥlingven II. /J. Karen/
- b/ Evoluo de la E-a poezio kun muzikigitaj specimenoj /Jodasová - Pečený/

Aprilo 1986

- a/ Problemoj de la traduko el ĉeĥa lingvo en Esperanton - I. /J. Karen/
- b/ Evoluo de E-a poezio kun muzikigitaj specimenoj /P. Jodasová/

La supre prezentitaj programpunktoj estos prezentataj konsiderante terminologiajn malfacilaĵojn en la ĉeĥa lingvo.

Ĉiu programo estos kompletigata per:

- a/ esperantlingva diskuto
- b/ informoj pri novaj esperantaj libroj
- c/ specimenoj el la esperantlingva kaj ĉeĥa kreado de membroj de la sekcio
- d/ esperantaj kantataj tekstoj
- e/ variaĵoj - laŭ aktuala bezono de ALS.

Ĉiuj kunvenoj de ALS okazos la trian sabaton emonate je la 14-a horo en la klubejo en Vejvodova strato n-ro 1, Prago 1. Al membroj de ALS la invitiloj estos regule dissendataj.

Sciigoj el Vjetnamio

HOCHIMINH. Ĉeĥoslovakaj geesperantistoj: D-ro Ludoviko Stankovič kaj edzino ing. Gjinjo Stankovičová /Bratislava/ kaj s-ano Miloslav Šváb /Havlovice/ vizitis Vjetnamion. Tuj okazis tre intimaj Ĉeĥoslovakaj-Vjetnamaj renkontoj. Ili konversaciis pri rezultoj de la Pac-Konferenco en Praha. La Bratislavaj gastoj ankaŭ transdonis E-lernilojn de Slovakio de longjara korespondantino Maria Kavanková al s-ano Nguyễn Dò KHÁNH, klubestro.

ZAMENHOFAN TAGON aranĝis VPEA kaj Esperanto-Klubo kun kultura programo. Ĉeestis la respondeculoj kaj aktivuloj: k-doj Nguyễn MINH KÍNH, Nguyễn HAI TRUNG kaj Nguyễn Dò KHÁNH kun gastoj kaj gemembroj. Oni faris ESP-ekspozicion kaj vendis diversajn Vjetnamajn E-eldonaĵojn.

CẦN THỚ. La fremdlingva fakultato kaj buroo de teknika-scienca informado de la Universitato en CẦN THỚ aranĝis Esperanto-kursojn por instruistoj kaj studentoj. Ekde marto 1984 gvidis la kursojn D-ro LÊ PHUỐC NAM.

TUYẾN QUANG. Kelkjare D-ro DINH HUY HÂN instruis la internacian lingvon kaj fondis E-Klubon por fakuloj en medicina Altlernejo de la provinco HA TUYẾN.


En urba gazeto de HOCHIMINH "SAIGÓN G.P." kaj semajna gazeto DAI DOÁN KẾT aperis artikoloj pri Esperanto, pri giganta 68-a Universala Kongreso de Esperanto en Budapeŝto kaj Esperanto-eldonaĵoj en Vjetnamio, de verkisto N. HAI TRUNG kaj s-ano Nguyễn Dò KHÁNH.

N.D. KHÁNH Hochiminh V.N.



Samideano
Miloslav Šváb
el Havlovice
kun s-ano
Nguyễn Dò Khánh

Dekstre: Ĝes-anoj Stankoviĉ
el Bratislava
kun s-ano Nguyễn Đỗ Khánh



Sube: Partoprenantoj de la
asocia porinstruista
ekzameno en Pardubice,
la 20-an de aprilo 1985.
En la ekzamenkomisiono
estis: Malovec, Vondroušek,
Kraft, Franc kaj
prof. Polenský





Per ĉiuj 25 vortoj vi pagos 15 Kčs au 5 irpk. Abonantoj el eksterlando turnigu al viaj perantoj pri detalaj informoj!

Ing. Luboš Zelený /38-jara/, verkisto, dez.kor.pri literaturo kaj vivo. Adreso: Ivana Olbrachta 211/23, CS-541 01 Trutnov - CSSR

KIU POVAS INFORMI PRI INTERSTENO, BONVOLU KONTAKTI MIN. Vladimír Turč, Tržní 521, CS-384 11 Netolice

Grupo de 8 gekomencantoj 18-60-jaraĝaj serĉas tutmonde leteramikojn. Interesoj normalaj. Skribu al: Esperantoklubo, MĚKS Rakovník, Ĉeĥoslovakujo.

32-jara farulo serĉas bonan amikinoŝon por la libertempo ĉe Nigra maro en Bulgario. Signo: Belaj travivaĵoj. Georgo Milev, Na vyhlídce 41, CS-360 11 Karlovy Vary, Ĉeĥoslovakio

Mi deziras interŝanĝi bildkartojn pri folkloro kaj pri ĉefurboj de la tuta mondo. Adreso: Vladimír Rotnekl, CS-669 02 Znojmo, Dobšice 297, Ĉeĥoslovakio. Ĉiam mi respondos.

Por daŭrlonga amikeco dez.kor. kaj konatiĝi kun gesam-ideanoj t.m. mezaĝa laboristo, edziginta. Reciproka gastigado ebla. Skribu al: V1. Horyna, Mračnická 2, CS-102 00 Praha 10, Ĉeĥoslovakio.

Pri rilatoj Esperanto-kiber-netiko kaj pri malpravigo de la dua principo de teorio de relativeco /A. Einstein/ pri rapideco de lumradio korespondas: Esperanta rondo, Tomáš Budínský, PS 761/P41, CS-Q39 19 Liptovský Mikuláš, Ĉeĥoslovakio

27-jara instruistino kolektas bildkartojn, diskojn, esperantajn librojn kaj proverbojn. Ŝi ŝatas viziti kineton, teatron kaj ŝi ŝatas vojagi. Adreso: Krystyna Mamok, ul. Zawadzkiego 12/150 43-100 Tychy, Pollando

MAGDALENA WROCLAWSKA /14-jara lernantino/, Grabonóg 62/1, PL 63-820 PIASKI, Pollando, deziras korespondi kun tuta mondo pri literaturo, kolektas bildkartojn kaj postmarkojn.

21-jara nova esperantistino interesigas pri diversaj temoj: Eglei Žilinskaitei, Pusiaio 50-39, SU-234520 Kapsukas, Litovio

20-jara Tatjana Zavjalova deziras korespondi kun e-istoj el ĈSSR. Adreso: SU-163002 Arĥangelsk, Novgorodskij, 32, korp.1, kv. 37, Zavjalova Tatjana

Kun knabino volas korespondi 7-aklasaniĝo Balajti Timea, Jubileum ter 2, 1 em.5 ajto 5000 Szolnok, Hungario.

19-jara hungaro havas hobiajn: lernado de lingvoj, sportoj, literaturo, kolektado de kasedoj kaj diskoj. Li parolas flue Esperante, angle kaj hispane, lernas la portugalan, italan, nederlandan kaj grekan lingvojn. Deziras korespondi kun knabo au knabino. Adreso: Zoltan Barta, Kolozsvari 10, 3659 S a t a , Hungario.

13-jara lernantino deziras korespondi kun samaga lernanto, interesigas pri belliteraturo, turismo, sporto kaj filmoj, ŝi petas foton. Ami Rangesova, Sofia 3, Bona 5-5.2 A bl. 17 vñ A et. 1 ap 1, Bulgario

26-jara gimnazia profesorino deziras korespondi pri muziko /kolektas fotojn de kantistoj/ pri literaturo, geografio kaj kolektas pejzagojn. Adreso: Marusia Petrova Aleksandrova, gimnazio "M. Todorov", urbo V a l c e d r a m , dis. Mi-hajlowgrad, Bulgario

Deziras korespondi Loia Tanceva, 2030 K o s t e m e c str. Iskra No 6, Bulgario

15-jara gimnazia studentino kolektas markojn kaj poŝtkartojn: Diana Bogomilova, ul. Otec Paisi 92, 3650 V ŭ I - c e d r ŭ m , Bulgario

30-jara instruistino deziras interŝangi E-lernolibrojn pri E-instruado kaj metodiko: Maria Petkova Slaveva, Iskra 22, 9700 Ŝ u m e n , Bulgario.

Gelernantoj 4-a ĝis 11-aklasaj deziras korespondi tutmonde kaj subskribi kontraktojn por reciproka gastado. Maria Petkova Slaveva, Iskra 22, 9700 Ŝumen, Bulgario.

Grupo de junaj speleologoj deziras akiri kontaktojn por kunlaboro kun samaj grupoj. Maria Petkova Slaveva /adr. kiel supre/.

10-jarulo 5-a klasano deziras korespondi: Jordan Valentinov Jordanov, Dragoevo, 9860 Ŝumen, Bulgario

17-jarulo: Marin Jordanov Kostadinov, Izvorna 23, 9706 Ŝumen, Bulgario

30-jarulo, fraŭlo, ŝoforo, pri sporto: Miglen Vačev Stankov, General Dragomirov 32, bl. 5 vñ. 5 et. 2 ap.107 9700 Ŝumen, Bulgario

22-jarulo, fraŭlo, ŝoforo: Radoslav Totev Dimov, Petra 8, et. 1, ap. 1, 9700 Ŝumen

18-jara e-istino korespondas pri profesio de flugistoj por aviadiloj: Veselka Raceva Kucarova, Kjulevča 9758 Ŝumen, Bulgario

S-ino Margarita Dimitrova, SKOA "St.Stamenov", ISRI, 9700 Ŝumen - interesigas pri kultivado de floroj kaj legomoj, historio, geologio kaj mineralologio, kolektas kalendaretojn, poŝtmarkojn kaj paperajn buŝtukojn.

S-ro Gančo Bojilov, str. Ŝumenska Komuna Nr. 34, 9700 Ŝumen, fraŭlo 22-jara, interesigas pri diversaj temoj.

F-ino Daniela Valeva, str. Vladajsko Vastanie Nr. 88, A, et.2 - elektristino en elektra kontrolo laboratorio, interesigas pri div. temoj.

S-ro Jordan Jordanov, str. L. Karavelov Nr. 58, 9850 P r e s l a v , Bulg., fraŭlo 24-jara, mehanikisto, interesigas pri diversaj temoj.

S-ro Oiva Haaparanta, Aaljo-ku 25540 K n a a p i l a , Finnlando - serĉas ĉeĥajn amikojn kun intereso pri astronomio kaj kiuj deziras viziti kelkfoje Finnlandon.

Novaj proponoj de nia MG-servo

Magnetofona pruntoservo de ĈEA, fondita komence de la pasinta jaro, disponigas nuntempe 19 kazetojn de la tipo C 60. Niaj klientoj pleje interesiĝis pri la sonbendigitaj kursoj, kvankam aliaj /prelegoj, muziko/ ankaŭ ne estis forgesitaj.

Magnetofona servo anoncas, ke ĝi havas kelkajn pliajn sonnotojn, kiuj ne estas en la fonoteka listo, nome ili ne estas prunteblaj pro manko de la sonbendoj. Tial ni vokas la afablulojn, kiuj volas helpi al la Servo: se vi havas superfluan kazeton, bonvolu sendi ĝin al ni. Ni rekompence pruntos al vi 2 niajn kazetojn lau la listo /normala pruntopago estas Kčs 25,- por unu kazedo/.

Ankaŭ ni bonvenigos novajn esperantlingvajn sonbendigojn egale ĉu bendojn aŭ gramodiskojn. Ni faros kopiojn por nia bezono kaj la originalojn ni resendos al vi, pagante vian sendokoston. Bonvolu unue kontaktiĝi kun ni por ne sendi ion, kion ni jam havas.

Lau la regularo niaj klientoj rajtas por sia bezono kopii la pruntitajn kazetojn. Por interesuloj, kiuj ne havas la necesan teknikan ekipaĵon, por estas tion fari - en kadro de la templecoj - la magnetofona servo.

Mendu liston de nia fonoteko! Kiu volas aliajn informojn, bonvolu sendi 1 Kčs-an poŝtmarkon por aŭfranki la respondon.

Adreso de la magnetofona servo estas

Josef Filip, Nádraží 146, 768 11 Chropyně

STARTO - presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská 10, CS-110 01 PRAGO 1, Ĉeĥoslovakio. Aperas 6-foje jare. Responda redaktoro Jiří PATERA, redakta komitato Jaroslav KAŠPAREC, Miroslav MALOVEC kaj Helena ŠTRUNCOVÁ. Desegnaĵo sur la titolpaĝo de Pavel RAK. Presas RUCH, presejo en Liberec
Sendita al la presejo la 20-an de junio 1985. Jarabono Kčs 24,-, por eksterlando Kčs 36,- au 10,50 gld. inkluzive de sendkosto.

STARTO - nepravidelný věstník Českého esperantského svazu, Jilská ul. 10, 110 01 PRAHA 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Odpovědný redaktor Jiří PATERA, redakční rada Jaroslav KAŠPAREC, Miroslav MALOVEC a Helena ŠTRUNCOVÁ. Kresba na obálce Pavel RAK. Povoleno k vydávání Národním výborem hl. m. Prahy, čís. rozhodnutí 310008385 ze dne 18. března 1985. Tiskne RUCH, podnik ONV, Liberec . Odesláno do tisku dne 20. června 1985. Roční předplatné Kčs 24,-, pro zahraničí Kčs 36,- nebo 10,50 guldenů, včetně poštovních výloh. Dohledací pošta Praha 07. Sniženy poplatek za poštovné povolen Ředitelstvem pošt Praha pod č.jedn. P/1 - 1267 ze dne 6. dubna 1979.

**Výtvarná řemesla
Praha**
Vám nabízejí široký
sortiment bytových
doplňků a dárkových
a upomínkových
předmětů,
vyráběných převážně
v malých sériích
s častou inovací.

NABÍZÍME:

**SOUSTRUŽENÉ MOCCA SOUPRAVY
SOUSTRUŽENÉ ODKLÁDACÍ STOLKY
MALOVANÉ PORCELÁNOVÉ SOUPRAVY
I JEDNOTLIVÉ KUSY
MALOVANÉ A BROUŠENÉ VÁZY, MÍSY
A POPELNÍKY
VÝROBKY Z CÍNU
BIŽUTERII KOVOVOU A KOŽENOU
A DALŠÍ SORTIMENT Z KOVU, KŮŽE,
KOŽENKY A TEXTILU**

**V našich prodejnách
naleznete
vhodné dárky
pro každou příležitost.
Naše pracovnice Vás
ochotně obslouží
a pomohou vybrat
předmět,
který potěší.**

Adresy prodejen upomínkových a dárkových předmětů:

110 00 Praha 1, Národní tř. 37	22 41 94
110 00 Praha 1, Vodičkova 28	24 47 71
110 00 Praha 1, Spálená 39	29 27 04
110 00 Praha 1, Na poříčí 35	23 17 315
110 00 Praha 1, Křížovnické nám. 2	26 63 28
120 00 Praha 2, Anglická 18	25 98 56
110 00 Praha 1, Lazarská 5	29 83 22
110 00 Praha 1, Železná 12	22 79 14
170 00 Praha 7, Obránců míru 17	37 44 84
110 00 Praha 1, Můstek — stanice metra	26 14 19
360 00 Karlovy Vary, Mariánská 2	930/28 381

Vzorkovna nábytku:

110 00 Praha 1, Václavské nám. 41	26 40 64
-----------------------------------	----------

přijímá objednávky na individuální zakázky
nábytku a bytových doplňků.

**Český esperantský svaz
110 01 PRAHA 1, Jilská 10**

NOVINY

Dohlédací pošta Praha 07
Snížený poštovní poplatek povolen
Ředitelstvem pošt Praha
J. ZN. P/1-1267/79 ze dne 6. 4. 1979